
Nº 03
1973

G.L. GIMELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti



IFEA

## 26-a I.F.E.F.-KONGRESO. TARRAGONO (HISPANIO)

de la 11-a ĝis la 17-a de majo 1973-a

**PROVISORA PROGRAMO**




Vendredo 10/5. Gazetara konferenco.
Kunsido L.K.K. - IFEF-estraro.
Sabato 11/5. Akcepto de la kongresanoj.
Interkona vespero.
Dimanĉo 12/5. Ekumena Diservo. Solena malfermo.
Komuna fotografado. Urba rondveturado.
Inaŭguro de Esperanto-Muzeo.
Hispana Arta Vespero.
Lundo 13/5. Kunsido estraro-komitato (ne publika).
Kunsido de la fakaj komisionoj.
Posttagmeza ekskurso.
Kongresa bankedo kaj internacia balo.
Mardo 14/5. Kunsido estraro-komitato (publika).
Akcepto fare de la Urbestro.
Fakprelego kaj filmprezentado. Folklora vespero.
Merkredo 15/5. Unua plenkunsido. Posttagmeza ekskurso.
Ĵaŭdo 16/5. Dua plenkunsido. Junulara vespero. Teatra prezentado.
Vendredo 17/5. Tuttaga ekskurso kaj fermo de la kongreso.
Sabato 18/5. Ekveturo per speciala vagonaro al Barcelono kaj
Postkongresa programo.

VENU MULTNOMBRAJ AL TARRAGONO!

## 58-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

BEOGRADO - Jugoslavio - de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 1973-a

La impona jara renkontiĝo de la tutmonda Esperantistaro okazis ĉi jare en Beogrado ĉefurbo de Jugoslavio. La multnombraj manifestacioj malebligis al mi detale raporti pri ili.

En la Kongreso partoprenis pli ol 1600 delegitoj, el 43 landoj, kiuj kolektiĝis en la salono Zamenhof de la Sindikata Domo. Kiel kutime, tiu impona manifestacio kortusis novajn kaj malnovajn Esperantistojn.

Kiel fervojisto mi volas iom detale priskribi la "fervojistan tagon", mardon 31-an de julio. Ĝi komenciĝis per la kontakta kunveno de I.F.E.F. en salono Maruci: partoprenis, preskaŭ 50 gefervojistoj el 14 landoj,(inter ili 10 italoj) por aŭskulti la fak-plegon de Inĝ. Ludoviko Sekereŝ pri la temo "Integra Transporto", prezidis Dipl.Ek. Gvozden Sredić. S-ano Kurt Greutert salutis la ĉeestantojn en la nomo de IFEF-estraro.

Tuj poste ĉiuj kuniris al Fervojista Muzeo kie, post akurata vizito gvidata de Sekereŝ kaj Sredić, oni regalis ilin per kafo kaj trinkaĵoj. Longe oni bombardis la gvidantojn per demandoj rilate al la organizo de la fervojoj kaj al la vivo de la fervojistoj en Jugoslavio.

Posttagmeze je la 14-a, en la kadro de la Internacia Somera Universitato "I.S.U." Mag. Sredić prelegis pri la fervoja temo "Ekonomieco de Transporto de varoj en Kontenerojn", prezidis Prof.d-ro Zoĵidar Popović, Rektoro de I.S.U. kaj d-ro Ralph A. Lewin. La altnivela prelego interesis la multnombran publikon kiu starigis viglan diskuton kiu daŭris longe post la prelego. Ĝia presita kompleta teksto, disdonita al ĉiuj ĉeestantoj kaj al ĉiuj gekongresanoj ĉe la kongresaj giĉetoj, estas tre bona helpilo por diskonigo de fervojaj problemoj ĉe la ekstera publiko.

Vespere, akompanataj de s-roj Buha kaj Sredić, en Skadarlija, la Beograda Montmartr, fervojistoj de sep diversaj nacioj, renkontiĝis ĉe tablo por festi sian longjaran amikecon. Malgraŭ la bruo, la muziko, la granda nombro de preter-pasantoj, agrabla etoso regnis inter ili, kiuj pasigis tie longajn neforgeseblajn horojn.

..//oo

Vendrede vespere grupo da fervojistoj diversnaciaj, invitataj de S-ano Buha, vizitis la sidejon de la fervojista societo "Branko Cvetkoviĉ" kie oni regalis ilin per abundaj trinkaĵoj kaj manĝaĵoj kaj eĉ folklora muziko, fare de grupo da Societanoj, kiu ebligis danci. La vespero daŭris per boatekskurso sur la Danubo ĉiam gvidata de amiko Buha.

G.G.

## DE JUGOSLAVIO AL ITALIO PER ESPERANTO

Por la unua fojo en Italujo, per Esperanto, okazis interŝanĝo de italaj kaj jugoslavaj geknaboj de elementa lernejo. En Cesena, la gelernantoj de lernejo Oltresavio gastigis de la 7-a ĝis la 13-a de junio, ses geknabojn el Zagrebo, Jugoslavio. Organizis ĉion la Internacia Kultura Servo el Zagrebo kune kun Lernejo Oltresavio kaj Unuiĝo E-Ramagna. Tio estas grava novaĵo, kiun oni devas substreki ĉar ĝi montras la ĉiam pli grandan disvastiĝon de Esperanto en Italujo. Italujo partoprenas, oficiale, kvinlandan eksperimenton por elementaj lernejoj, kiu finiĝos la venontan junion 1974-an, En tiu dato kunvenos en Maribor (Jugoslavio), la geknaboj de la lernejoj partoprenantaj la eksperimenton, subtenintan de La Kultura Slovena Ministerio. La Urbestro de Cesena akceptis en la urbodomo la junan delegacion el Zagrebo, kiu estis akompanita de la Direktoro de Internacia Kultura Servo, Tiŝljar Zlatko. Bonvenigante la gastojn, la Urbestro Lucchi substrekis la gravecon de tiuj-ĉi kulturaj interŝanĝoj kaj la tre amikaj rilatoj inter la jugoslava kaj itala popoloj.

Lernejo "Oltresavio" en Cesena estas la unika lernejo kie, devige, 330 geknaboj lernas Esperanton en la kadro de integrativaj agadoj.

Dum la semajna restado de la jugoslavaj gastoj, la 10-an de junio okazis ĉe Teatro Bonci pedagogia kunveno pri la instruado de Esperanto en elementaj lernejoj. La ĉeestantaj 200 geknaboj kantis kaj paroladis esperante antaŭ multnombra publiko. Estis praktika pruvo pri la valoro de Esperanto, konfirmita de la ĉeesto de aŭtoritatuloj kiel Prof.Mario Dazzini, de Itala Esperanto Federacio, Prof-ino Catina Dazzini, de ILEI, krom Direktoro Mariani kaj Inspektoro Giocolieri. Dum sia parolado, Direktoro Mariani klarigis al la ĉeestantoj la tri kialojn de la elekto de Esperanto en sia lernejo: nome, Esperanto estas ilo por pli bone koni la gepatran lingvon; propedeŭtiko por lernado de fremdaj lingvoj; helpo al naskiĝo de internacia konscienco.

La Instruistino de la lernejo "Oltresavio", Prof-ino Gianfranca Taddei, dum sia prelego rakontis pri la eksperimento, kiun ŝi komencis je la fino de oktobro 1972-a, do nur antaŭ sep monatoj, kaj evidentigis ĝiajn rezultojn, laŭ la tri celoj klarigitaj de Direktoro Mariani. Laŭ sia sperto, Prof-ino Taddei konstatis ke la korespondado de gelernantoj kun samaĝuloj de la tuta mondo allogis ilin reciproke lernadi amuze Esperanton, kaj ke la interŝanĝo kun eksterlandanoj estas baza ilo por konkreta edukado al internacia konscienco, sen teoriaj paroladoj.

ROMEO PAGLIARANI

## KION VI SCIAS PRI GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO?

"La Fédération espérantiste du Travail" (Esperantista Federacio de Laboro) 179, Rue Ordener, F-75018 Paris, en Francio proponas al vi dusemajnan ferion en tiu lando dum somero 1974-a.

Internacia, frata etoso kun esperantistoj kaj neesperantistoj el diversaj landoj. Grupa vojaĝo ek de Parizo ĝis reveno al Parizo (Eblo vojaĝi individue ĝis G.D.R.). Aliĝo al F.E.T. ne postulata.

Se tiu vojaĝ-formulo interesas vin, bonvolu tuj sendi vian principan aliĝon (kiu tute ne engaĝas vin) al William GILBERT, 30, Rue Croix-Montoire, 37100 TOURS (Francio). Detalajn informojn vi ricevos en ĝusta tempo. Tiu ĉi alvoko koncernas ne nur francajn esperantistojn sed ankaŭ samideanojn el najbaraj landoj. La ĉeesto de forta plurnacia esperantista grupo interne de neesperantista rondo de turistoj povas komprenеble konsistigi efikan propagandon por nia lingvo.

..//oo

## ESPERANTAJ MANIFESTACIOJ

**44-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO = TRENTO de la 15-a ĝis la 22-a de septembro 1973-a**

TEMO: "ESPERANTO KAJ DISVASTIGO DE LA KULTURO EN LA MONDO".

### PROVIZORA PROGRAMO

15-a de septembro (sabato)
9 - 20 h. - Alveno de la kongresanoj kaj disdonado de dokumentoj;
Posttagmeze-Kunsido de Itala Esperanto-Federacio;
17 h. - 3-a Kunveno de la Sekretarioj I.R.K.E.; Gazetara konferenco;
Vespere - Interkona vespero.
16-a de septembro (dimanĉo)
8,15-9,20 h.-Diservo en Esperanto en la preĝejo de S-ta Lorenzo;
9,30 h. - Fotografado en Placo Dante;
10 h. - Malfermo de la kongreso en la salono de la Regiona Palaco;
15,30 h. - Oficiala inaŭguro de la Pentra kaj Filatela ekspozicioj;
Vespere - Asembleo de Itala Esperanto-Federacio "I.E.F.".
17-a de septembro (lundo)
8,30 h. - 2-a Ĝenerala Asembleo de I.E.F.;
Posttagmeze-Laborado de Studrondoj;
20,30 h. - Literatura kaj teatra aŭ kina vespero.
18-a de septembro (mardo)
Matene - Laborado de studrondoj; Gvidata vizito al la urbo;
Posttagmeze-Kunsido de I.E.J., de Itala Instituto de Esperanto, de I.F.E.A. kaj de U.E.C.I. Por familianoj: aŭtobusa ekskurso al Cembra-Valo kaj al la kastelo de Segonzano;
Vespere - Gustumado de tipaj vinoj kun vespermanĝo ĉe "Vecchia Trento" (malnova Trento); Kongresa balo.
19-a de septembro (merkredo)
Mateno - Kunsido de I.L.E.I., raportoj de la studrondoj; Por aliaj: gvidata aŭtobusa arta vizito al la urbo;
Posttagmezo-Kunsido de I.E.J.; Fermo de la kongreso kaj aprobo de la rezolucioj; Vespere - Folklora vespero.
20-a de septembro (ĵaŭdo)
8 h. - Tuttaga ekskurso per aŭtobuso tra la Dolomitoj; Vizito al urbo Bolzano kaj bankedo en karakteriza loko de Alto Adiĝo.
21-a de septembro (vendredo)
10 h. - Proklamado de venkintoj ĉe Pentra ekspozicio kun disdono de premioj kaj de diplomoj;
Posttagmeze-Ekskursoj al Lagoj de Caldonazzo kaj Levico;
Vespere - Prezentado de vestmodo (defilo) ĉe la Grand'Hotelo Trento.
22-a de septembro (sabato)
Matene - Ekskurso sur Monto Bondone; Posttagmeze-Foriro de kongresanoj.

EKSTERLANDANOJ PARTOPRENOS SENPAGE LA KONGRESKOTIZON.

ORGANIZANTO: GRUPPO ESPERANTISTA TRENTINO, Via Cavour 17=38100 TRENTO.

**KONFERENCO DE LA FERVOJISTA SEKCIO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO en PLZEŇ (ĈSSR)**

PROGRAMO:

14/9 - Vendredon - Akcepto de gepartoprenantoj
15/9 - Sabaton - 9,30 - 10,00 Grava Informado pri la Konferenco
10 - 12 h.- Komitat- kaj komisiono- kunsidoj
10 - 12 h.- Trarigardo de la urbo kun ebleco viziti muzeojn (regionan aŭ bierajn), galerion, preĝejan turon, ktp.
13,30-18,00 - Plena Kunsido. 19,30 - Interkona vespero.
16/9 - Dimanĉon - 9,30-11,30 - Amika antaŭtagmezo.
13,30 h. - Trajna ekskurso al la kastelo Kozel.
17/9 - Lundon - 8,00 - 12,00 - Ekskursoj al la lokomotivfabriko Škoda kaj bierfabriko Pilsner Urquell kun gustumado.

ESTU BONVENANTA EN PLZEŇ! L. LANI, Pod vrchem 59, 312 07 PLZEŇ 4.

## 6-a TRILANDA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EL AŬSTRIO, ITALIO, JUGOSLAVIO

en VENEZIA - de la 28-a ĝis la 30-a de septembro 1973-a

P R O V I Z O R A   P R O G R A M O

Vendredon la 28-an de septembro: ek de la 9-a h. oni malfermas la akceptejon ĉe E.Grupo "La Gondolo" -D.L.F. Stacidomo Venezia S.L.

11,00 h. Malfermo de la ekspozicio de esperantaj libroj-gazetoj-revuoj-ktp. ĉe "Palazzo Giustinian" Calle Vallaresso (ĉe S.Marko Placo)

13,00 h. Tagmanĝo - Posttagmezo libera. 19,30 h. Vespermanĝo.

20,30 h. Amika interkona vespero ĉe Teatro Dopolavoro Ferroviario apud restoracio por Fervojistoj "La Lucciola" flanke Stacidomo S.L.

Sabaton la 29-an de septembro: 9,00 h. Motorboata rondveturado

13,30 h. Tagmanĝo. 15,30 h. Komuna trairo per motorboato tra la Granda Kanalo ĝis la S.Marko Placo-trarigardo de urbaj vidindaĵoj.

17,30 h. Solena kunsido en "Salone delle Colonne di Palazzo Giustinian" Salutado. Mallonga parolado pri "Esperanto kaj Turismo". Tosto.

20,00 h. Vespermanĝo. 21,00 h. Amuzvespero ĉe Teatro Dopolavoro Ferr.

Dimanĉon la 30-an de septembro: 9,00 h. Katolika Diservo ĉe preĝejo S.ta Moisé (apud la S.Marko Placo).

9,30 h. TRILANDA FESTKUNVENO: publika debato sur la temo "La internacia lingvo Esperanto en komerco, en la lernejoj" ĉe Komerca Ĉambro.

13,00 h. Tagmanĝo. 14,30 h. Libera posttagmezo aŭ fiksenda ekskurso.

20,00 h. Fino de la 6-a Trilanda Renkontiĝo. Inter la 20-a kaj 21,30 h. oni trovos vagonarojn por reveturi hejmen al ĉiuj direktoj en kaj eksterlande. L O Ĝ A D O Pri la loĝiga servo zorgas Hotelo Atlantide-Calle della Misericordia, 375. Cannaregio I-30121 Venezia, al kies mastro oni povas senpere antaŭmendi la ĉambron sen antaŭpagojn. Samajn dezirojn oni povas adresi al E.Grupo "La Gondolo" Ĉe D.L.F. I-30121 VENEZIA S.L. Organizaj kialoj devigas antaŭmendi la loĝadon kiel eble plej frue. ALIĜKOTIZO: It.Liroj 1'100 (aŭ 30 Aŭ.Ŝilingoj, aŭ 30 Jug.dinaroj) al poŝtĝirkonto n-ro 9/27294 S-ro Tarlindano S.F. Cannaregio 53/a I-30121 Venezia. Por faciligi la partoprenon, oni konsentas pagi la aliĝkotizon je la alveno ĉe la akceptejo, kondiĉe ke oni sendu ĝustatempe la aliĝilon.

## JARKUNVENO DE FRANCA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO "F.F.E.A." EN PARIZO

La Ĝenerala Kunveno de la Franca Sekcio de IFEF okazos la 20-an kaj 21-an de Oktobro 1973-a en Parizo. Jen la Programo:

Sabate 20/10: 14-a h. Vizito de la Katakomboj
20-a h. Turista vespero sur Sejno

Dimanĉe 21/10: de la 9-a ĝis la 11-a h. - Oficiala Kunveno
13-a h. Bankedo kaj vizito de la kastelo de CHANTILLY (norde de Parizo). La oficiala kunveno okazos dimanĉe, je la 9-a, en la salonoj de U.A.I.C.F. (Intelekta kaj Belarta Unuiĝo de la Francaj Fervojistoj) 11, Rue de Milan -Paris 9°, apud la stacidomo Saint-Lazare. La akceptejo estos malfermita ekde la 9-a sabate, en la jam indikita loko.

## E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

RADIO ROMA - ESPERANTO. Casella Postale 320 = I-00100 ROMA (Italujo)
Redaktoro: d-ro Antonio DE SALVO, via Olbia, 15 = I-00182 ROMA (Italujo)
Kunlaboras: d-ino Vera DI TOCCO kaj F-ino Mirella MERLANI.

La elsendoj okazas ĉiudimanĉe, de la 21-a horo ĝis la 21-a kaj 20 minutoj (mezeŭropa tempo) sur ondlongoj: metroj 30,90 41,24 25,42
kilohercoj 9'710 7'275 11'800

La unua parto de la elsendo estas dediĉita al "Novaĵoj el Italujo" (kaj de tempo al tempo al "Leterkesto"); la dua parto al "Kuriero de Esperanto".

Kun plezuro kaj dankemo ni akceptas kontribuaĵojn de niaj aŭskultantoj (informojn, dokumentan materialon, rimarkojn kaj sugestojn pri la aŭdebleco kaj la enhavo de la elsendoj). La redakcioj de la E-gazetoj estas afable petataj konsideri la eblecon havigi al ni ekzempleron de siaj eldonaĵoj, kiujn ni utiligos por niaj elsendoj menciante la fonton. A.DESALVO.